Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 29-500

NRO 5-6
4-a JARO
MAJO-JUNIO 1949

EL LA ENHAVO:

Nia Kongreso en Graz
Internacia konferenco de fervojistoj en Vieno
Esperanto-Valuto
Amika letero el Plzen
La Esperanto-movado en Aŭstrio
Informoj de Laborista Esperantistaro
Katolika Esperanta Vivo
Internacia Esperanto-movado
Bibliografio

LASTA INFORMO:

Aŭstria Instruministerio dekretis la starigon de du novaj ŝtataj Esperanto-ekzamenkomisionoj. — Aŭstria Ŝtata Trafikoficejo instalis specialan Esperanto-sekcion. — Aŭstria Esperanto-poŝtmarko aperis la 21. Junio 1949.

1949 APRIL

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- kaj eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4,—. Ni petas, skribu bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Aŭstrio. — S-ro J. Preining, Schönegg 8, Vorder-Weissenbach, Mühlviertel, interŝ. PM kaj il. PK kun tutmondo. Resp. garantiata.

E-grupo en St. Pölten deziras kor. kun eksterlandaj ges-anoj. Resp. garantiata. Adreso: s-ro Franz Marauschek, St. Pölten, Mariazellerstr. 34 a, N.-Ö.

Cehoslovakujo. — S-ro Miloslav Filka, 26 j. oficisto, Stojanova 6/III, Brno, kor. kun s-anino el Aŭstrio. — S-ro Milan Selbicky, en Kovaĉ p. Konecchlumi, studento de reala lernejo kor. kun aŭstria s-ano, interŝ. PM, gazetojn; scias franc. kaj germ. lingvojn.

F-ino Jozefino Kopriva, 20 j. kudristino, blonda kun malhelaj okuloj, kor. kun aŭstriaj s-anoj. Adreso: Vajanskeho 762, Nove Mesto n/Vah., ČSR.

Belgujo. — S-ro Pirotte Jozefo, 26 j. ministo, strato Cesar de Paepe 26, Micheroux — Soumagne, Liĝo, kor. kun samaĝaj aŭstriaj s-aninoj aŭ interŝ. PK. Resp. gar.

Japanujo. — S-ro Taro Nišiumi, prof. ĉe Saga Nova Universitato, Daigaku. Saga-ŝi, Saga-Ken, kor. kun aŭstrianoj.

S-ino Mari Malda, tajlorino, 161, Kaŭahara-Koji, Saga-ŝi, Saga-Ken, kor. kun aŭstriaj ges-anoj.

F-ino Sajoko Jamamoto, Takamogaita-ryo, 40 Takamovizumi-ĉo, Sakjoku, Kioto, kor. kun aŭstriaj ges-anoj.

F-ino Ĉielko Hitaka, 8, Edogaŭa — 5 ĉome, Edogaŭa-Ku, Tokio, kor. kun aŭstriaj ges-anoj.

INTERNACIA TURISMA SERVO. — Por gvidado, prizorgo de ĉiuranga hotelo, senkostaj turistaj prospektoj Esperante kaj nacilingve, reciproka gastigado k. t. p. kontaktu kun Internacia Turisma Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Bruselo, Belgujo.

Atentu! Dum la someraj monatoj, ekde Julio, Esperantosendoj de Radio-Wien okazos nur ĉiun lundon matene, de 6.30—6.35, sendilo Wien I, ondlongoj 506.8, KW 25, 30, 41, 48.

AŬSTRIA
ESPERANTO-REVUO

4-a jaro | MAJO/JUNIO 1949 | n-ro 5—6

Nia Kongreso en Graz

Nur kelkaj semajnoj ankoraŭ disigas nin de nia tutaŭstria Esperanto-Kongreso en la ĉefurbo de la verda lando Stirio. El ĉiuj grupoj en la federaciaj landoj la gesamideanoj sin jam anoncis kaj ankoraŭ sin anoncos por la partopreno en la kongreso. Tial ni povas esperi, ke la grandarangxo esperantista en Graz inde vicigxos al niaj pasintaj kongresoj en Kufstein kaj Linz.

Kiu legis la arangxprogramon ellaboritan de la vigla Loka Kongres-Komitato sub la energia gvidado de gxia prezidanto profesoro A. Hainschegg kaj afergvidanto Josef Eder, forte helpata de la AEF-landestro por Stirio d-ro A. Halbedl, tiu certe konvinkigxos, ke nia nunjara kongreso en Graz eĉ superos la pasintajn.

La landestro de Stirio Josef Krainer kaj la urbestro de Graz profesoro d-ro Eduard Speck afable transprenis la protekton super la Esperanto-kongreso. La landa registaro de Stirio kaj la magistrato de Graz subtenis la arangxon de la kongreso per gravaj subvencioj kaj la kongresdelegitoj kaj eksterlandaj gastoj oficiale estos akceptataj de la urbestro en la urbdomo.

Gravega okazo por nia ideo estos, ke en la kongresurbo oficiale estos inaŭgurata „Esperanto-placo". Per tio Graz havos la honoron esti la unua urbo en Aŭstrio, kiu nomis publikan placon laŭ la ideo Esperanta. Kun gxojego ni aŭstriaj geesperantistoj akceptis ĉi tiun decidon de la urba konsilantaro de Graz.

Ne malpli grava por nia movado estos, ke eĉ la universitato de Graz afable disponigos salonon por prelegoj kaj paroladoj en kaj pri Esperanto.

Kaj la Dio-servo kun Esperantoprediko montros al vasta publiko, ke la lingvo internacia ne nur taŭgas por realaj aferoj, sed same ankaŭ povas servi al animoj Dion serĉantaj.

Kiel kutime okazos en la kadro de la kongreso ankaŭ la jara ĉefkunveno de la Aŭstria Esperantista Federacio. En gxi la centra estraro de AEF, la landaj AEF-estraroj kaj la delegitoj el ĉiuj federaciaj landoj raportos pri siaj laboroj, sukcesoj aŭ malsukcesoj dum la agad-

jaro. El tiuj raportoj respeguliĝos la malfaciloj kun kiuj devis kaj devas lukti la aŭstria Esperanto-movado, kies kaŭzoj plejparte devenas de la ĝenerala internacia situacio. La bedaŭrinda disiĝo de la mondo en orientan kaj okcidentan ŝtatblokojn nuntempe ne estas favora por pli rapida antaŭenigo de la Esperanto-movado en tutmondo kaj ankaŭ prokrastas nian komunan ĉefcelon: enkonduki Esperanton en la lernejojn.

Tamen malgraŭ ĉiuj malhelpoj ni en Aŭstrio ankaŭ atingis diversajn gravajn sukcesojn, el kiuj ni povas ĉerpi la esperon kaj certecon, ke post starigo de nia ŝtata suvereneco nia ideo akiros novajn, prosperigajn ekmovojn.

Hodiaŭ ni jam certe scias, ke diversaj oficialaj ŝtataj, urbaj kaj publikaj instancoj forte simpatias al la lingvo internacia kaj apogas ĝin laŭpove. La lasta kaj vaste videbla pruvo por tio estas la ŝtata eldono de Esperanto-poŝtmarko, kion ni ĉefe dankas al nia Honor-Prezidanto, ĝenerala poŝtdirektoro d-ro Karl Dworschak.

Sed tiuj oficialaj apogoj devigas ankaŭ nin geesperantistojn laŭpove streĉi ĉiujn niajn fortojn por plivastigi kaj plifortigi nian movadon. Tio estos unu el la ĉefceloj de nia kongreso en Graz, ke ĝi donu al ni superrigardon pri ĉio jam akirita kaj instigu nin al novaj kaj pli grandaj sukcesoj.

Sed krom la laborkunsidoj, kunvenoj, propagand- kaj amuzaranĝoj la Aŭstria Esperanto-Kongreso havos ankaŭ alian plej gravan celon: En nia turmentita mondo, regata de la ŝtataj egoismo, malfido kaj „malvarma milito" ĝi estu voko por la popola interkompreniĝo, ĝi estu laŭ nia ideo flama manifestacio por la paco tutmonda.

Internacia renkont de fervojistoj en Vieno

La 1.—3. Aprilo 1949 okazis en la sindikata domo de la Aŭstria Fervojista Sindikato en Vieno internacia renkontiĝo inter fervojistaj esperantistoj, kiu estis sukcesplena antaŭlaboro por la konferenco de IFEF, okazinta dum Majo ĉj. en Aarhus.

Partoprenis 26 gekolegoj el Francujo, 3 el Holando, 3 el Danlando, 2 el Italujo kaj 1 el Svisujo. Kune kun la delegitoj el la aŭstriaj federaciaj landoj kaj Vieno la aranĝo do havis sufiĉe internacian karakteron. Bedaŭrinde mankis la gekolegoj el la orientaj landoj, sed ili sendis salutleterojn al la kunveno. Dum du-taga konferenco estis traktataj problemoj koncernantaj jenajn fervojistajn aferojn:

a) Kiel kaj per kiuj rimedoj ni propagandu Esperanton inter la fervojistaro ĉiulande? — b) Interŝanĝ-ferioj inter fervojistaj gekolegoj

diverslande. — c) Enkonduko de Esperanto kiel telegraf- kaj trafiklingvo ĉiulande. — d) Kompilo kaj eldono de fervojista fakvortaro Esperanta.

Al la aŭstria esperantista fervojistaro dum la konferenco sukcesis atingi, ke la sindikato faka konsentis fondi apartan Esperanto-fakgrupon en la kadro de la sindikato kaj la sindikatestraro promesis tiun fakon forte subteni. La kunsidojn ankaŭ partoprenis kiel gastoj altrangaj personoj el la ŝtata, publika kaj sindikata sferoj, kiuj parte faris salutparoladojn.

Tre favore paroladis la ĝeneraldirektoro de la ŝtata aŭstria fervojadministracio d-ro Ernst Seidler, la aŭstria ĝeneralpoŝtdirektoro kaj vicprezidanto de ILEPTT d-ro Karl Dworschak, la prezidanto de la aŭstria fervojista sindikato parlamentano Freund, kaj la ĝenerala sekretario de la ŝtata fervoja administracio d-ro Dantine, kiu same kiel la aliaj eminentuloj promesis ĉian helpon, sed tamen akcentis, ke ĉio dependas de tio, ke la fervojistoj ĉiulande energie laboru kaj varbu por Esperanto kaj praktike uzu ĝin kaj tiamaniere montru al siaj fervojaj administracioj la internacian valoron de la lingvo.

Salutis la kunvenon la prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio eksministro d-ro Hans Frenzel. Kortega konsilisto d-ro Wollmann transdonis al la kunveno la gravan sciigon pri starigo de du novaj ŝtataj E-ekzamenkomisionoj.

Nome de la 26 francaj fervojistaj delegitoj parolis ties gvidanto Robert Rètault, sekretario de la Franca Fervojista E-Asocio, el Nederlando la prezidanto de la Nederlanda Fervojista E-Ligo Lok. Por la Internacia Fervojista E-ista Federacio parolis ties prezidanto Stapel kaj pluajn salutparoladojn faris d-ro C. Borione kaj s-ano Quarone el Italujo, s-anoj Torsten kaj Christoffersen el Danlando kaj Kaiser el Svisujo. Nome de UEA parolis la aŭstria ĉefdelegito s-ano Höfert. Nome de la Aŭstria Poŝtista E-societo salutis s-ano J. Janecka.

Estro de la Aŭstria Fervojista E-fakgrupo, Josef Zink, kiu kune kun s-ano Hawla bonege aranĝis la renkontiĝon, tre lerte prezidis la kunsidojn. Al s-ano Zink kaj al lia helpa stabo ni ŝuldas specialan dankon. Multan kaj elkoran dankon ankaŭ meritas la sekretariino de la Viena E-Centro, s-anino Maria Loibel, kiu zorge kaj detale kunhelpis en la antaŭpreparo kaj aranĝo de la renkontiĝo, kies bona sukceso ankaŭ estis ŝia merito.

Nome de la kunveno estis sendataj salutleteroj al diversaj altrangaj ŝtat-, parti- kaj sindikatfunkciuloj, kiuj poste respondis per dankleteroj al AEF. Urbestro d-ro Körner petis al AEF, esprimi lian dankon ankaŭ al ĉiuj eksterlandaj delegitoj ĉe la renkontiĝo kaj lian

bedaŭron, ke li ne havis okazon persone akcepti kaj saluti la diverslandajn gastojn.

La rezolucioj proponitaj de la diverslandaj gekolegoj unuanime estis akceptataj. La interkonatiĝvesperon partoprenis ĉirkaŭ 450 personoj kaj dankis al ĉiuj parolintoj per varma aplaŭdo. De la sindikata estraro ĉeestis la kolegoj Freund, Thaller kaj redaktoro s-ano Kovacic.

Multan elkoran dankon meritas la fervojista sindikato, kiu finance ebligis la amuzvesperon kaj la ekskurson per kvar autobusoj, dum kiu la eksterlandaj delegitoj povis vidi Vienon kaj ĝian belan ĉirkaŭaĵon.

La Vienaj kolegoj tre bedaŭris, ke la karaj gastoj en Vieno povis resti nur kvar tagojn, ĉar ili post la renkontiĝo ankoraŭ vizitis la urbojn Linz, Salzburg, Innsbruck kaj fine nian vaste konatan pioniron kolegon A. Hilkersberger en Landeck.

La fervojista renkontiĝo estis post la milito la unua internacia Esperanto-Konferenco en Vieno kaj ni esperas, ke la eksterlandaj gekolegoj estis kontentaj konsiderante la nuntempajn cirkonstancojn. Trovis sin novaj amikoj kaj per tio estis ree masonita briko por novkonstrui la mondfederacion de la paco, en kiu kunlaboros la popoloj ĉiulande amike kaj harmonie.

Du novaj stataj E-ekzamenkomisionoj

La 19. 3. 1949 la aŭstria instruministro d-ro Felix Hurdes subskribis dekreton, per kiu estas ordonita la starigo de du novaj „Ŝtataj ekzamenkomisionoj por la instrufako de la mondhelplingvo Esperanto ĉe publikaj mezaj lernejoj kaj pri la pruvo de scio de Esperanto".

La oficiala sidejo de la komisionoj estas Graz (Stirio) kaj Innsbruck (Tirolo).

La ekzamenkomisionon de Graz konsistigas jenaj ges-roj: Prof. d-ro Adolf Hainschegg (Graz), direktoro, kaj membroj estas d-ro Adolf Halbedl (Knittelfeld), Franz Schöpfer, lernejkonsilanto en pensio (Voitsberg) kaj Johanna Konrad, instruistino (Ottendorf).

Al la ekzamenkomisiono de Innsbruck apartenas jenaj s-roj: D-ro Leo Blaas (Natters), direktoro, kaj membroj estas prof. d-ro Leonhard Eder (Innsbruck) kaj ŝtatoficisto Johann Steiner (Kirchbichl).

AEF nome de la aŭstria esperantistaro sincere dankas al s-ro ministro d-ro Hurdes pro ĉi tiu grava por la E- movado dekreto kaj same esprimas koran dankon al la vicprezidanto de AEF, sekcia konsilisto en la instruministerio, s-ano d-ro Maximilian Fiihring, kiu grave subtenis la peton de AEF pri starigo de la nomitaj komisionoj.

Esperanto-Valuto

En la jaro 1906 la matematikisto kaj Esperantisto René de Saussure en Ĝenevo, legante Esperantistajn gazetojn el diversaj landoj observis, ke la prezoj de la gazetoj kaj anoncitaj komercaĵoj ĉiam estis indikataj en la valuto de la respektivaj landoj. Ĉar la universala Esperanto sin turnas al la tuta mondo kaj el ĉiuj ĝisnunaj mondlingvaj projektoj estas la plej bona, tial al Saussure ŝajnis esti necese, ankaŭ krei komunan valuton, kiu ne anstataŭu la diversajn landvalutojn, sed nur estu uzota por la celoj de la eksterlanda trafiko apud la naciaj valutoj. Tian helpmonon li elpensis kaj nomis ĝin „Spesmil". Kiel ĝian valoron profesoro Saussure fiksis ok gramojn da oro konsista 11/12, kio egalis teorie al 0.733 gramoj de pura orvaloro.

La Esperantistaj gazetoj rapide akceptis ĉi tiun ideon kaj krom la respektiva landvaluto ili ĉiujn prezojn ankaŭ indikis laŭvalore de la internacia helpmono Spesmil. Pli poste la en London vivanta germana grandindustriisto Herbert F. Höveler fondis specialan bankon, la „Chekbanko Esperantista", kiu en la jaro 1907 ekprovis la uzadon de la Esperanta valuto kun plej bona sukceso.

Tiu ĉi banko baldaŭ nombris 1027 klientojn en 43 landoj tutmonde. Ankaŭ grandaj germanaj firmoj al ĝi apartenis. Grava bankteknika novaĵo de tiu Esperanta banko estis la internacia poŝtkarto-ĉeko. Tio estis poŝtkarto konsistanta el du partoj. La maldekstra duono estis apartigebla pagokarto, dum la dekstra parto estis ordinara poŝtkarto por sciigoj. Per tio oni povis malmultekoste asigni ankaŭ pli malgrandajn sumojn de lando al lando.

Winston Churchill reakceptante ĉi tiun ideon, en 1923 eĉ proponis en la angla parlamento krei specon de tia Esperantovaloro kaj ankaŭ en Usono varbis por tia projekto.

La unua mondmilito ne nur detruis tiam la Esperanto-movadon, sed ankaŭ la pluan uzadon de la internacia Spesmil-valuto, kies internacia valoro forgesiĝis, kaj la okazoj 1933 en Germanujo ankaŭ nuligis ĝian revivigon fare de W. Churchill.

W. Churchill kaj aliaj konataj ŝtatistoj nuntempe multe diskutas pri la fondo de Eŭropa Unio, pri mondparlamento kaj mondregistaro. Eble ili ankaŭ pensas pri tio, ke tiuj certe salutindaj projektoj, kies efektivigo eble povos garantii la sopiratan daŭran mondpacon, por ilia praktika funkciado krom aliaj premisoj ankoraŭ bezonas du gravajn: komunan lingvon kaj komunan valuton simile al la iama bone funkcianta Esperanto-valuto Spesmil.

Dr. Emmerich Pabisch.

Amika letero el Plzen, C. S. R.

Plezure mi ricevis la sciigon, ke multaj el miaj bonkonataj aŭstriaj kamaradoj feliĉe travivis la teruraĵojn de la pasinta mondmilito. Volonte mi ĉiam memoras miajn voĵaĝojn en Vienon kaj tra Aŭstrio, ĉar dum miaj vizitoj tie mi sentis min pro la kora kaj kamarada akcepto preskaŭ kiel en mia propra hejmlando. Tiajn agrablajn tagojn inter gastamaj kaj afablaj gekamaradoj oni ne povas forgesi.

Mi eĉ bone memoras mian unuan paroladon en Vieno la 14. Aprilo 1918, kiam ankoraŭ ekzistis la aŭstri-hungara imperio. Mian lumbildprelegon tiam aranĝis la Esperanto-asocio de la instruistoj en la fiziksalono de la Nova Komerca Akademio. La sukcesplenan prelegon per enkondukaj vortoj malfermis la konataj Esperanto-pioniroj en Aŭstrio profesoro Otto S i m o n kaj direktoro Josef S c h a m a n e k kaj partoprenis ĝin internacia publiko: ĉeĥoj, germanoj, hungaroj k. a. Laboristoj, profesoroj, oficistoj, instruistoj, ateistoj kaj monaĥoj, ĉiuj pace aŭskultis mian paroladon kaj ĉiujn unuigis la sopiro kaj klopodo forigi per la lingvo neŭtrala la miskomprenojn inter la popoloj kaj krei atmosferon de amika kunvivado inter ĉiuj nacioj.

Okaze de alia vizito mi partoprenis kun Vienaj gekamaradoj ekskurson al la historia kastelo Kreuzenstein. Poste ni banis en la proksima Danubo. Alifoje mi en montaro serĉis kaj trovis k-don Franz J o n a s (F. J. nun estas urbkonsilisto de Vieno kaj gvidanto de la fako por nutraĵaferoj. La redakcio.), kiu tien ekskursis kun skoltoj. Tuj ili kuiris „gulaŝon“ (viando en suko) kaj invitis min kunmanĝi. Sed poste la bela vetero aliiĝis kaj terure ekpluvegis. Kiam mi hejmen venis en la loĝejon de mia gastiganto, k-do Alfred B e r d a n, mi estis tute malsekega, kion oni germane esprimas per „durch und durch“. Sinjorino Berdan tiam pro mi havis multe da laboro sekigante dumnokte miajn vestaĵojn.

Mian lastan viziton en Vieno mi faris en 1931 kaj tiam prelegis pri miaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj Afriko en la popola altlernejo de la IX-a distrikto antaŭ multnombra esperantista aŭskultantaro. En 1932 mi ankoraŭfoje kunvenis kun aŭstriaj kamaradoj en Praha okaze de la IFETT-konferenco kaj en 1933, kiam k-do Alfred Berdan vizitis la Esperanto-societon en Plzen kaj estis mia gasto. Sed poste ŝanĝiĝis la politika situacio, venis en 1933 la naciismo en Germanujo kaj 1934 ankaŭ Aŭstrio perdis sian demokration. Kelkajn jarojn pli poste sekvis la katastrofo de la mondmilito kaj ĉiuj fadenoj kun miaj aŭstriaj gekamaradoj disŝiriĝis.

Sed okaze de mia nunjara 67 jara naskiĝtago krom aliaj skribaĵoj ankaŭ el Vieno flugis gratulkarto de k-do Berdan al mi, tiamaniere

atentigante min, ke ankaŭ aŭstriaj kamaradoj ankoraŭ tenas min en bona memoro. Kaj de k-do Josef Z i n k mi ricevis gazeton.

Estas por mi granda honoro, ke eĉ post paso de tiom da jaroj en mia maljuneco multaj eksterlandaj gekamaradoj rememoras min, kio alportis al mi grandan ĝojon.

Kore mi do salutas ĉiujn konatajn (kaj nekonatajn) gekamaradojn en Vieno, Linz, Innsbruck kaj Lienz, kun kiuj mi siatempe travivis belegajn, neforgeseblajn tagojn en amika kaj kamarada atmosfero. Varmege al ĉiuj mi premas la manon, kaj mi diru al ili, ke malgraŭ ĉiuj nunaj malhelpaĵoj nia nobla ideo tamen venkos kaj por tiu malfacila, sed sankta tasko, deziras al ili multe da sukceso via malnova ĉeĥa kamarado

Josef P e c h, Plzen.

Kaj mono kaj mano

Por militado necesas: unue mono, due mono kaj trie denove mono. Tiu verdiro validas ankoraŭ hodiaŭ. Kaj ĝi validas ne nur por la militado, sed por ĉiuj aferoj de la homa vivo. Ĝi validas ankaŭ por nia movado. Por la varbado, por la propagando, por flugfolioj kaj broŝuroj, por la eldono de nia Revuo necesas mono kaj denove mono. Niaj membroj ja pagas siajn kotizojn kaj ni devas konstati, ke krom malmultaj esceptoj ili pagas regule. Sed la duonon de la kotizoj jam absorbas la elspezoj por la Revuo, la dua duono servas por la pago de la lukostoj, salajro kaj diversaj elspezoj. Inter ili la kostoj por afranko de leteroj ktp. ne restas en lasta vico. Ni scias, ke por multaj inter ni jam la pago de la kotizo normala signifas ian oferon. Estas la laboristoj, malaltrangaj oficistoj, pensiuloj. Estas la altaj vivkostoj kaj la malaltaj salajroj. Sed estas ankaŭ aliaj inter ni, kiuj tamen troviĝas en pli bona stato. Kiuj do povus subteni nian movadon per kromkotizo, per sporadaj donacoj. Se ni volas efike antaŭenpuŝi nian movadon, ni bezonas monon, multan monon. Pro tio ni instalis propagandofonduson. Jam montriĝis la unuaj sukcesoj. Vidu la liston de la donacintoj. Sed tio nur estas komenco. Ni alvokas ankaŭ tiujn, kiuj ĝis nun ne aŭdis nian vokon. Ili ne plu hezitu. Neniu, kiu povas, rifuzu nian alvokon. Ĉiu, kiu povas, donu sian parton. Neniu pro honto, ke li ne povas doni pli multon, donu nenion. Donu do kaj la sukceso de niaj agadoj kontentigos vin.

Sed ni bezonas ne n u r vian monon. Ni bezonas ankaŭ viajn m a n o j n. Multan monon ni povus ŝpari, se ni havus viajn manojn, se ni m e m povus fari tion, por kio ni alie devas pagi. Kaj multon ni povus fari, kio sen via persona helpo entute ne povas esti farata. Ni

alvokas vin do al via aktiva kunlaboro. Ĉu en la grupoj, ĉu en la Centro. Ĉiu dediĉu kelkajn horojn de sia libertempo en la semajno, en la monato. Por ĉiu troviĝos laboro laŭ lia metio, laŭ liaj spertoj. Demandu ĉe la estro, ĉe la sekretario. Ili distribuos al ĉiu konvenan taskon. Anoncu vin por la kunlaboro en la grupoj, en la Centro. Ni bezonas vian m o n o n kaj vian m a n o n. Amikoj, ni vokas vin!

L. G.

ESPERANTO-MONADO en Aŭstrio

Aŭstria Esperanto-Kongreso 1949
okazos de la 16. — 20. Julio 1949 en la ĉefurbo de Stirio, G r a z, en la mahagona salonego de la Laborista ĉambro.

Leter- kaj telegramadreso: Esperanto-Kongreso Graz 1949, Graz, Aŭstrio.

Esperanto-poŝtmarko
okaze al la E-Kongreso estas eldonata de la aŭstria poŝtadministracio kaj en la kongresejo estos uzata ekstra poŝtstampilo.

Kongressubvencion de ŝil. 3000.— donis la Landa Registaro de Stirio kaj 2000.— ŝil.
donacis la urbestro de Graz al la Loka Kongresa Komitato.

Landestro de Stirio Josef K r a i n e r kaj **urbestro de Graz prof. d-ro E. S p e c k** afable transprenis la protektadon super la Aŭstria Esperanto-Kongreso.

Flagoj
estos sur la administraj domoj de la urbo Graz honore al la Kongreso.

Oficiala akcepto.
Landestro de Stirio kaj urbestro de Graz solene akceptos la Esperantistajn funkciulojn kaj eksterlandajn delegitojn kaj gastojn en la urbdomo kaj salutparolos al la kongresantoj de sur la urbdoma balkono. Sur la ĉefplaco muzikos orkestro okaze de la akcepto.

„Esperanto-placo“
en la proksimo de la kongresejo solene estos inaŭgurata post la akcepto.

En la universitato de Graz
okazos paroladoj pri Esperanto. Profesoro Adolf H a i n s c h e g g parolos pri „Esperanto kaj la poezio“. Aliaj referatoj kaj prelegoj estas en preparo.

Katolika Diservo kun Esperanto-prediko
okazos komence de la Kongreso en la Ursulinen-preĝejo.

Esperanto-ekzamenoj
pri la scio de la lingvo kaj instrukapableco okazos en la kadro de la kongreso.

Esperanto-balo
kun naciaj dancoj en naciaj kostumoj estos aranĝata, kiu donos al la kongresantoj eblecon por gaja amuziĝo.

Rabato sur la tramo
por la kongresantoj estis proponata de la urbestro al la direkcio de la urba tramentrepreno.

Ekskursoj
en la belan ĉirkaŭaĵon de Graz kaj vizito de vidindaĵoj ĝojigos ĉiujn kongresanojn.

Jara ĉefkunveno de AEF
kaj diversaj fakkunsidoj estos aranĝataj ĵen la kadro de la Kongreso.

Promesas ĉiuj tiuj aranĝoj, ke la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz fariĝos grava kaj impona manifestacio Esperantista kaj ni esperas, ke ne nur la aŭstria Esperantistaro el ĉiuj federaciaj landoj multnombre partoprenos nian Kongreson, sed ĝin ankaŭ vizitos — afable invitate — laŭeble multaj delegitoj kaj gastoj el la eksterlando.

Petante informojn de la LKK bonvolu aldoni reafrankon.

La Loka Kongresa Komitato.

Esperanto-poŝtmarko aŭstria.

Ni ĝoje povis jam lastnumere komuniki al la Esperantistaro, ke ni en Aŭstrio denove atingis gravan sukceson. Okaze al la Aŭstria Esperanto-Kongreso 1949 en Graz (16. — 20. 7. 1949) ia aŭstria poŝta administracio eldonis la 21. Junio 1949 specialan Esperanto-poŝtmarkon valore de 20 groŝoj.

Ni denove atentigas la ges-anojn pri tio, ĉar ili havos bonan okazon por afranki presaĵojn kaj skribaĵojn per la aŭstriaj E-poŝtmarkoj kaj tiamaniere ilin povos havigi ankaŭ al siaj gekorespondantoj en tutmondo.

Aŭstria ŝtata trafikoficejo starigis specialan Esperanto-sekcion.

Dum la lasta tempo la aŭstriaj Esperantistoj povis raporti pri diversaj sukcesoj. La plej nova sukceso estas, ke la aŭstria ŝtata trafikoficejo oficiale starigis en sia kadro specialan Esperanto-sekcion.

La aŭstriaj eminentuloj ja bone scias la valoron de internacia lingvo kaj ili laŭpove subtenas niajn klopodojn. Per la kreo de oficiala Esperanto-sekcio en la kadro de la ŝtata trafikoficejo Esperanto nun enpenetras en la praktikan uzadon.

Ĉu la faro fariĝos efektiva sukceso, dependas de la esperantistoj tutmondaj. Pro tio ni nun petas ĉiujn geesperantistojn, subteni nin per skribo de gratulkartoj al la sube menciita adreso. Ĉiu skribinto ricevos belan prospekton pri Aŭstrujo afrankitan per la nova Esperanto-poŝtmarko. Do, via alskribo havos bonan kompenson kaj neniu Esperantisto preterlasu, akiri belan prospekton kaj Esperanto-poŝtmarkon.

La celo de tiu ĉi Esperanto-sekcio ne nur estas, varbi vizitantojn por nia Aŭstrujo, ĝi ankaŭ praktike laboras. Se iu Esperantisto pro iu ajn kaŭzo venos Aŭstrujon, li nepre petu informojn pri vojaĝo, hotelo, vizo ktp. ĉe la menciita sekcio. Se karavanoj intencas viziti nian landon, la gvidantoj unue interrilatu kun la Esperanto-sekcio de la trafikoficejo kaj ĝi certe klopodos plifaciligi kaj pliagrabligi la vojaĝon. Ĝi preparas viziton de plej belaj lokoj kaj plej eble malmultekostan restadon. Estas intencate, krei specialajn restadejojn somerajn kaj vintrajn por Esperantistoj. Eble jam venontan vintron povos okazi skisporta semajno en Tirolo gvidata de esperantista skiinstruisto. En belaj banlokoj kaj montaraj restadejoj estos preparataj rezervitaj loĝejoj por Esperantistoj. Do, ĉu vi venos sole aŭ karavane en nian landon, la Esperanto-sekcio de la trafikoficejo ĉiam estos preta, servi al vi plej eble bone.

Ni ankaŭ intencas aranĝi vojaĝojn al

eksterlando. Esperantistoj, kiuj havas rilatojn al trafikoficejoj kaj vojaĝentreprenoj, instigu kontakton kun la aŭstria trafikoficejo per Esperanto. Ebligos reciproka gastigado.

Esperantistoj tutmondaj, komuniku la starigon de la Esperantosekcio ĉe la aŭstria ŝtata trafikoficejo ankaŭ al viaj konatuloj, ĉu esperantistaj, ĉu neesperantistaj. Por vi tiu fakto estu bona propagandilo kaj per tio vi ankaŭ helpas al nia movado. Kaj ne forgesu skribi karton al
Aŭstria trafikoficejo / Esperanto-sekcio
Friedrichstraße 7, Wien I., Aŭstrujo.

Noto: La E-gazetoj ĉiulande afable estas petataj represi ĉi tiun gravan komunikon tute aŭ ekstrakte kaj la radioservantoj bonvolu ĝin plurfoje diskonigi per siaj landaj sendiloj.

796.400 subskriboj el Aŭstrio

UEA komence de Aprilo informis nin, ke pro la kolektiva aligo de la Aŭstria Popola Partio kaj diversaj aliaj organizoj la cifero por la UNO-peticio el Aŭstrio tiutempe estis 796.400. Per tio Aŭstrio lokas en la sesa vico post Germanujo, Japanujo, Cehoslovakujo, Nederlando kaj Britujo.

Tiun gravan sukceson ni parte ŝuldas al s-ano d-ro A. Halbedl, Knittelfeld, kiu iniciatis al aligon kolektivan de la Popola Partio kun 650.000 anoj.

Viena polica direkcio por Esperanto

Responde al la salutletero, direktita al la polica prezidanto de Vieno okaze de la Internacia Fervojista Renkontiĝo en Vieno, s-ro polica prezidanto J. Holaubek sendis al AEF dankleteron, per kiu li ankaŭ esprimis sian personan ŝaton al Esperanto kaj atentigis, ke la polica direkcio estas preta akcepti de la E-Centro taŭgajn proponojn por eventuale aranĝi E-kursojn inter la Viena policistaro.

Kortega konsilisto d-ro F. Wollmann

instiginto kaj iama direktoro de la Aŭstria ŝtata ekzamenkomisiono pri Esperanto, solenis la 12. 1. 1949 sian 50-jaran doktor-jubileon. Pro tiu okazo AEF kore gratulis al s-ano d-ro Wollmann nome de la tutaŭstria esperantistaro.

E-societo „Danubio"-Wien

okazigis la 27. 2. 1949 sian jarkunvenon. Raportis estro R. Cech pri la societagado, s-anino Ziwutschka pri la kasstato. Dumjare okazis 23 kunvenoj, la biblioteko ampleksas 435 volumojn. Por AEF-centro salutparolis d-ro L. Grimme. En la novan estraron estis reelektata kiel estro s-ano kalkul-sekretario R. Cech.

E-kluboj „Kalocsaj" kaj „Laboro"

Ambaŭ grupoj kune laboras en la kadro de la Popola Altlernejo de Währing kaj Alsergrund. La grupoj aktive laboras, kio evidentiĝas el la raportoj de la lasta jarkunveno. Kelkaj kursoj estis aranĝataj, same E-espozicio en la Popola Altlernejo. La grupoj honoris s-anon C. Gasperini okaze de lia 76a naskiĝfesto per aparta festeto. 250 librojn nombras la biblioteko kaj kelkaj eksterlandaj E-gazetoj estas por la grupoj abonataj. Grupvesperoj ĉiuĵaude de 19 — 21 h. en la reallernejo, XVIII., Schopenhauerstraße.

Tirol

En la junulara sindikatejo de Landeck gvidas s-ano A. Hilkersberger E-kurson por 22 gejunuloj. — En Schwaz komenciĝis kurso gvidata de s-ro Kleisner. — 2500 flugfolioj varbcelaj en Schwaz kaj Wörgl estis disdonataj. — Du novajn varbprospektojn pri Tirol eldonis la Urba Trafikoficejo en Innsbruck. Aliaj estas en preparo. — Teatra grupo „La Verdaj Fulmoj" en la metilernejo de Innsbruck estas fondita de d-ro Karner. — Internacia karavano ĉi-somere estas atendata en Landeck. — Novaj kursoj estiĝis en Kirchbichl, Wörgl, Jenbach, Kufstein kaj Brixen. — La turisma oficejo de Centra Dana E-Ligo aranĝos dum Julio karavanon al Tirol.

Esperanto en la popola lernejo de Kirchbichl

La estro de la nomita lernejo enkondukis nedevige Esperanton. La instruado okazas ĉiulunde de 17.30 — 19 h. Li mem elektis la plej talentajn geknabojn ekde la 4a klaso. Partoprenas 39 geknaboj kaj 10 instruistoj. La geknaboj fervore lernas. La kurson gvidas senkoste s-ano Hans Steiner.

Innsbruck

La E-grupo novelektis sian estraron. S-ano Martin Stöckl denove elektiĝis estro; F. Mitterberger, vicestro; J. Bauer, kasisto; Rosa Wiendl, sekretariino; d-ro R. Kofler, bibliotekisto. La nova gruphejmo estas en la gastejo „Ottoburg". Kunventagoj: la la kaj 3a vendredo ĉiumonate. Kursoj okazis lastvintre en la Popola Altlernejo, gvidata de s-ano Stöckl, en la metilernejo kaj en la polica direkcio, gvidata de s-ano d-ro Karner, kiu nuntempe ankaŭ gvidas kurson por progresintoj.

Radio Innsbruck, Tirol

sendis la 4. 3. 1949 E-paroladon de d-ro Leo Blaas, teme: Esperanto kaj la lernejo. Dua parolado okazis la 29. 3. 1949. Estas alcelate, ke almenaŭ dufoje monate okazu paroladoj pri Esperanto. Petu regulajn elsendojn ĉe la nomita sendilo.

3 novaj E-prospektoj pri Tirol

La unua nomiĝas „Tirolo-Aŭstrio" kun belaj ilustraĵoj kaj sinoptika karto de Tirolo, eldonita de la Landa Trafikoficejo por Tirolo, Innsbruck. — La dua titoliĝas „Innsbruck-Tirol", same bele ilustrita kaj eldonita de la Urba Trafikoficejo de Innsbruck, Burggraben 3, kiu ankaŭ eldonis la trian prospekton „Igls-Tirol" kaj varbas per ĝi por la vizito de la belega kuracloko Igls. — La nomitaj prospektoj senpage estas haveblaj ĉe s-ro Hans Steiner, Esperanto-servo Kirchbichl, Tirol, Aŭstrio.

Nova E-grupo en Vorarlberg

Al la klopodoj de la senlaca s-ano A. Seiwald, Sägergasse 12, Bregenz, Vorarlberg, ni dankas la fondon de dua grupo en Vorarlberg. Estro de la novfondita grupo estas s-ano H. Ruedl, Bregenz, Vorkloster, Achgasse 34.

E-societo „Verda Stelo" — Salzburg

La ĉijara ĉefkunveno okazis la 30. 4. 1949. La novelektitan estraron gvidas nia bonkonata s-ano instruisto Franz Fötinger. S-ano dir. Sappl raportis, ke li sukcesis enkonduki Esperanton en la Komercan Akademion de Salzburg. Pri tio detaloj sekvos pli poste.

S-ano Fötinger gvidas kurson por progresintoj en la Popola Altlernejo kaj kurson en la 5a klaso de la popollernejo Franz-Josefs-Kai. Kurso ankaŭ okazas en la kadro de la Junulara Ruĝa Kruco kun 38 knaboj 12 — 14jaraj. La 4. 4. 1949 okazis salutvespro por la eksterlandaj E-fervojistoj, dum kiu interpretis Lya Russmayr. La 8. 5. ĉj. estos aranĝata ekskurso al Hallein kune kun la AKLE-grupo.

Eksterlandaj E-fervojistoj en Salzburg

Reveturante de la Internacia renkontiĝo de E-fervojistoj en Vieno, grupo el ili vizitis Salzburgo-n kaj kore estis akceptata de la Fervojista E-fakgrupo en la kunvenejo de la E-societo „Verda Stelo".

La gastojn salutis s-ano A. Huber de la fakgrupo, O. Seifried nome de la Fervojista sindikato kaj s-ro Kimml, sekretario de la Laborista ĉambro. Nome de la urbestro salutparolis urbkonsilanto Pacher, kiu same kiel la aliaj parolintoj akcentis la valoron de Esperanto por la fremdultrafiko kaj popola interkompreniĝo.

Parolis por la francaj delegitoj s-ano Tuffier, vicprez. de la francaj E-fervojistoj, por la holandanoj s-ano Stapel, prezid. de IFEF, por la danoj s-ano Christoffersen. Per emodiaj vortoj ili dankis pro la gastama akcepto en Aŭstrio kaj raportis pri la agado de siaj organizoj.

Laste parolis la estro de „Verda Stelo“, s-ano Fötinger, bonvenigis la eksterlandajn gastojn en Salzburg, raportis pri la aŭstria E-movado kaj esprimis la dankon al la Laborista ĉambro, kiu depost 1945 laŭpove subtenis la E-movadon en Salzburg kaj eĉ aranĝis specialajn E-kursojn en la Popola Altlernejo. Kiel lerta interpretistino funkciis s-anino Lya Russmayr.

Dum la salutvespero honore al la eksterlandaj gastoj estis prezentataj de la societo „Alpina“ landaj popoldancoj, muziko kaj kantoj. Riĉa aplaŭdo dankis al la kunagantoj kaj bonhumora babilado ankoraŭ longe kunigis la geesperantistojn de Salzburg kun iliaj karaj gastoj.

Bildpoŝtkartoj de Graz kun E-teksto

La AEF-landestaro de Stirio disponas pri granda kvanto de du specoj de bildpoŝtkartoj de Graz kun teksto ankaŭ en Esperanto. Prezo po 25 groŝoj. Mendeblaj kontraŭ antaŭpago plus 10% por sendkostoj ĉe: A. Podrepschek, Graz, Sackstr. 16/I, poŝtĉeka konto 49742, E-Verein „Einigkeit“, Graz.

„Der Wanderer“ — Österreichische Reisezeitschrift

(La migranto — Aŭstria vojaĝgazeto) eldonanto direktoro J. Ebner, Graz, decidis servi kiel kongresgazeto de la Aŭstria E-Kongreso 1949 kaj eldoni tri specialajn numerojn, por kio la redakcio meritas nian sinceran dankon. En la gazeto ankaŭ estas aperigata E-kurso.

La nomita gazeto aperas dumonate kaj estas ilustrita. Jarabono ŝil. 4.—. Adreso: Graz, Albrechtgasse 3.

Radiosendilo „Alpenland“

(Graz, Zusertalgasse 14a) dissendas depost Marto 1949 ĉiun 1an ĵaŭdon de la monato E-informojn de 23 — 23.15 h. MET per ondo 383.6 m. Kiel jam anoncite, krome okazas ĉiuvendrede E-sendoj de la 18.15 — 18.30 h.

Landes-Fremdenverkehrsamt für Steiermark

(fremdultrafika oficejo de Stirio, Aŭstrio) aldonas al la „Stiria gasteja libro“ kaj „Stiria gvidilo“ enkondukan tekston en Esperanto.

St. Pölten, N.-Ö.

La 4. 3. 1949 okazis en nia regiono la unua esperantista renkontiĝo ĉijare. Parolis k-doj Feilbacher kaj Balaque, informante la ĉeestantojn pri la E-movado ĝenerale kaj pri la aranĝo de E-tago en St. Pölten dum Aprilo, ĉe kiu ankaŭ partoprenos gek-doj el Vieno kaj aliaj najbaraj lokoj. Grupfunkciuloj intervenis ĉe s-ro direktoro Kaska de la Popola Altlernejo, ke li akceptu Esperanton en la lernejprogramon, kion direktoro Kaska afable promesis. La 17. 3. 1949 komenciĝis E-kurso en la fabriko Voith.

Nekrologo

Antaŭ nelonge mortis en Oberpullendorf s-ano Karl Farkas. Okaze de lia enterigo parolis ĉe la tombo lastan adiaŭon delegito de la Burgenlanda E-Ligo kaj transdonis florkronon nome de la asocio. Ni konservos al la mortinto daŭran memoron.

Mortis la 18. 4. 1949 en Wien nia malnova s-ano Viktor Piringer, iama aktiva kunlaboranto en la Tramista E-fakgrupo. La enterigon partoprenis nome de la grupo k-do H. Braun. Ni tenos la mortinton en nia daura memoro.

„Die Frau“ (la virino)

(Wien V., Rechte Wienzeile 97) jam de longe ĉiusemajne publikigas E-kurson kaj raportojn pri Esperanto. Tial ni sendu al la redakcio de la gazeto konsentajn skribaĵojn — precipe la esperantistinoj kaj lernantinoj — ĉar per tio ni povas pruvi, ke la intereso pri la E-rubriko ankoraŭ ne lamiĝis kaj instigas pri daŭrigo de E-publikigaĵoj. Do, ne forgesu kaj tuj skribu!

Aŭstriaj gazetoj raportantaj pri Esperanto

Lastnumere de AER ni publikigis liston de aŭstriaj gazetoj kaj revuoj, kiuj akceptas kaj aperigas artikolojn kaj raportojn pri Esperanto. Ni nun aldonas novan liston kaj petas la ges-anojn, ke ili laŭeble sendu gazetojn kun E-publikigaĵoj al la E-Centro.

„Volksstimme" — „Wiener Kurier" „Der Eisenbahner" — „Die Frau" — „Donaueuropäischer Informationsdienst" — „Neues Österreich" — „Burgenländische Freiheit" — „Burgenländisches Volksblatt" — „Freies Burgenland" (daŭrigota).

Mondcivitana movado aŭstria por Esperanto

Ni raportis en n-ro 3—4 de AER, pĝ. 36, pri la mondcivitana movado en Vieno, kiu akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon interŝtatan.

Same harmonia kunlaboro inter tiu movado kaj la E-movado estas raportita el Linz, kie konstituiĝis la Landa grupo Supra Aŭstria de la Unuiĝo de l' mondcivitanoj en Aŭstrio.

S-ano Helmuth Gerbert (Linz, Promenade 17) fariĝis la aŭstria ĉefperanto por Esperanto ĉe la nomita unuiĝo kaj li petas ĉiujn geesperantistojn aktive kunlabori ankaŭ ĉe la organizo de l' mondcivitanoj, por ke Esperanto ĉiuloke enpenetru en ĉi tiun movadon. La ges-anoj, kiuj jam kunlaboras en la m. c.-organizo, sciigu sian adreson al la supre indikata ĉefperanto.

Libroŝparado

La libroŝparado, enkondukita antaŭ du jaroj, preskaŭ tute forgesiĝis. Ni alvokas la Esp.-grupojn varbi denove kaj instigi ĉiujn gesamideanojn akiri per malgrandaj sumetoj Esp.-librojn, samtempe helpante al la malfacila eldonado de novaj verkoj. La valoro de ĉiu lingvo mezuriĝas laŭ ĝia literaturo. Esperanto bezonas eĉ pli bonan literaturon ol la naciaj lingvoj. Tial kontribuu vian parton per libroŝparado!

Demandu en viaj grupoj, kiuj petu ŝparmarkojn de la AEF.

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

Nekrologo

Mortis la 27. 5. 1949 neatendite nia kara k-dino Anna Zottl, bibliotekistino de la grupo „Harmonio", Wien. Okaze de ŝia cindrigo parolis nome de la grupo kaj de la Laborista Esperantistaro la k-doj Vokal kaj Haiderer kortuŝajn adiaŭajn vortojn, esprimante la gravan perdon, kiun suferis pro ŝia tro frua morto la laborista E-movado.

Kiuj konis nian afablan kaj ĉiam aktivan k-dinon Zottl, tiuj certe konservos al ŝi koran memoron.

La „1a de Majo" de la viena esperantistaro socialista

Kiel ĉiujare ankaŭ ĉijare ni partoprenis la manifestacion de la socialista partio kaj tiamaniere efikplene varbis por nia movado.

Inter 250.000 gekamaradoj, kiuj preterpasis la tribunon starigitan sur la urbdomega placo, ankaŭ marŝis du fortaj grupoj da esperantistoj. Ili kunportis grandajn ruĝajn flagojn kun nia verda stelo kaj ankaŭ stangrubandegon sur kiu estis skribita „Per Esperanto por socialismo".

Ĉie la grupoj aplaŭde estis salutataj kaj multfoje el la rigardantaro esperantlingve alvokataj.

De sur la tribuno, kie staris la estraroj de la socialista partio kaj de aliaj socialistaj unuiĝoj, nin salutis kore la vickanceliero de Aŭstrio, d-ro Schärf, la urbestro de Vieno d-ro Körner kaj multaj aliaj.

Speciale ni ĝojis, ke ni povis tie ankaŭ saluti nian kamaradon el Utrecht, kiu kun grupo de holandaj sindikatanoj estis gasto de la aŭstria sindikata ligo. Starante ankaŭ sur la tribuno li povis rigardi tiun 3 horojn daŭrantan impona manifestacion por paco kaj justeco en la mondo. La socialista esperantistaro per parolhoroj vere plenefike faris propagandon por interfratiĝo de la popoloj kaj por Esperanto.

La socialista esperantistaro

kunvenis la 27. 4. 1949 en la E-Centro kaj per belega programo estis surprizita.

Festparoladis okaze de la „1a de Majo" d-ro Grimme.

Per improvizita „Radio Esperanto", per kantado kaj muziko la horoj rapide pasis.

Specialan ĝojon kaŭzis la ĉeesto kaj parolado de la k-do el Utrecht (Holando), kiu en vere kortuŝaj vortoj pledis por interfratiĝo kaj homaranismo. Li estis kun 40 kamaradoj holandaj en Vieno gasto de la Sindikata Ligo, sed la lingvaj baroj malhelpis la fratecan interrilaton reciprokan, malgraŭ ke ili lernis la germanan lingvon kaj havis interpretistojn.

„Nur kiam mi venis inter vi, karaj esperantistaj gekamaradoj, mi tute estis feliĉa, ĉar nun ne plu ekestas por mi lingvaj baroj!" li fine diris. Socialistoj, vizitu niajn kunvenojn, kiuj okazas ĉiun 4an merkredon de la monato en la E-Centro.

SAT-kongreso 1949 en Paris

Kvankam la cirkonstancoj nuntempe por nia movado ne estas tre favoraj, anoncis sin 30 geesperantistoj por partopreni la kongreson. Niaj gastoj el Francujo, kiuj estis en Vieno dum la Fervojista-Renkontiĝo ebligis per la pago de franca mono por la gastigado ĉi tie, la restadon en Parizo. Do, ĉijare ni sukcesos ĉeesti ankaŭ la SAT-kongreson.

Laboristaj geesperantistoj anoncu vin!

En la lastan numeron de AER ni enmetis flugfolie alvokon pri aliĝo al ambaŭ sekcioj de la Aŭstria Laborista Esperantistaro kun aldonita aliĝdeklaro. Sed ni devas konstati, ke ankoraŭ multaj gek-doj mankas en niaj vicoj, ke ili prokrastas sian aniĝon.

Tial ni denove memorigu vin, ke ni nur povas enpenetri la partiojn kaj sindikatojn, kiam ni pruvos al ili la grandan nombron de Esperanton parolantaj gelaboristoj. Ni atendas ankaŭ vian eniron en niajn vicojn! Gek-doj, aktiviĝu kaj aliĝu!

La estraro de ALE.

Internacia Grafika Esperanto-Ligo (IGEL)

La reprezentanto por Aŭstrio de IGEL (sidejo en Ulvsunda, Svedujo) estas s-ano Johann Jawernik, kompostisto, Voitsberg, Postfach 2, Stmk., Aŭstrio. Li varbas anojn inter la faka gekolegaro. La monate aperanta „IGEL-Informilo" informas pri la laborkondiĉoj de la grafikaj laboristoj tutmonde. La gekolegoj do estas petataj komuniki al la reprezentanto sian aliĝon al IGEL. Pli detalaj informoj kontraŭ reafranko.

National Council of Labour Colleges

(Nacia konsilantaro de laboristaj universitatoj) la plej disvastigata, ŝtate ne monsubtenata, laborista eduk-organizo en la mondo, en Tillicoultry, Skotlando, anoncas per cirkuleroj la okazigon de skribaj kursoj en Esperanto por komencantoj kaj progresintoj. Por organizitaj laboristoj la kurso estas senpaga.

Internacia Virina Tago 1949

en Vieno estis bona okazo por varbi

inter la partoprenintinoj por Esperanto. Tion lerte eluzis la socialistaj esperantistoj kaj distribuis milojn da flugfolietoj inter la virinoj, atentigante ilin pri la lingvo internacia, la popolojn interliganta interkompreniĝilo.

„Der Naturfreund“ (La naturamiko)

la oficiala organo de la societo „La Naturamikoj“, daŭre aperigas Esperanto-angulon. La redakcio anoncas publikigon de E-kurso, pri kio certe ĉiuj „Naturamikoj“-esperantistoj kaj ĉiuj aliaj ĝojos.

Josef Pech el Plzeň, Č. S. R.

festis la 14. 3. 1949 sian 67 jaran naskiĝtagon. Multaj malnovaj k-doj certe bone memoras k-don P e c h, kiu en la jaro 1931 en Vieno faris lumbildparoladojn en Esperanto pri siaj vojaĝoj tra tuta Eŭropo. K-do Pech per karto al la redaktoro de AER sendis por ĉiuj Vienaj kaj aŭstriaj gek-doj korajn salutojn. Ni varme reciprokas ilin kaj deziras al li, ke li ankoraŭ multajn jarojn ĝisvivu en plena korpa kaj spirita freŝo.

„Esperantista Sindikatano“

E-lingva multobligita organo de la Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda aperas dumonate. La informilo enhavas raportojn de la Mondsindikata Ligo kaj sciigojn el la sindikata E-movado. Abonprezo en la n-ro 2, kiu nin atingis, ne indikita. Redakcia adreso: Ferdinand, 20, rue du Biquet, Belges (Gironde) Francujo.

Esperanto ĉe la Sindikata Monda Federacio (F. S. M.)

Konsiderinte, ke la Esperantista celo estas la enkonduko de nia lingvo ankaŭ en gravaj internaciaj organizoj, ni Esperantistaj sindikatanoj unuigas niajn fortojn por akceptigi Esperanton ĉe F. S. M.

Ni konstatis, ke klopodoj faritaj rekte al la estraroj ĉiam malsukcesis pro malfavoro al Esperanto de tiuj estraroj, ofte ankaŭ pro kontraŭbatalo de Idistoj, Occidentalistoj, Basic-Englishistoj, k. a.

Pro tio ni decidis agadi per nia lingvo mem kaj pruvi ĝian taŭgecon. Tio estas farebla ĉe F. S. M., ĉar ni povas efektivigi plenumendajn taskojn de tiu organizo, nome:

a) Edukado de la anoj. — Ni efektivigos ĝin parte per nia bulteno, siigante al niaj k-doj sindikatajn novaĵojn el tutmondo, traktante la diversajn doktrinojn kaj vidpunktojn pere de ĝia rubriko „Libera Tribuno“. Tiamaniere ni al multaj k-doj ebligos juĝpovon, kiuj ĝis nun nur konas ideon sian.

b) Internacia solidareco. — Nur per internaciaj renkontoj, korespondado kaj legado de tiaj presaĵoj ĝi povas esti vekata kaj Esperanto tion ebligas.

c) Unuigi la laboristojn por internacia agado. — Tiun taskon ni morale efektivigos per nia gazeto „Esperantista Sindikatano“, kiu konstante pledos por unueco de la laboristaro.

Ni estas certaj, ke ĉi tiu peresperanta agado baldaŭ aliformiĝos al poresperanta, ĉar ni tradukos gravajn artikolojn el nia bulteno nacilingve kaj tiamaniere ni komprenigos al neesperantistoj la neceson de nia lingvo kaj varbos ilin por nia ideo.

Sindikatanoj, al kia ajn organizo vi apartenas, sciigu viajn opiniojn kaj spertojn al S. E. A. T., 20 rue du Béquet — Bègles, Gironde, Francujo.

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

Dio-servo vespera

okazis sabate la 9. 4. 1949 en la restarigita kapelo de Katholischer Gesellenverein (Katol. metiista unuiĝo) en Wien VI., Gumpendorferstraße 39. Nia eklezia konsilanto pastro G. Plank celebris sanktan meson, dum kiu ni preĝis kaj kantis Esperante, kaj faris meditigan E-predikon pri la suferado de Kristo kaj nia devo por helpi al la savo de la paco inter la homaro. Post la Di-servo ni en la samdoma salonego povis saluti pli ol 50 AKLE-anojn kaj karajn gastojn kaj atentigi pri niaj sekvontaj taskoj konekse kun la Sankta Jaro 1950 en Romo, kie supozeble okazos de 10.—17. 8. 1950 la 22a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso.

S-ano L. Huber parolis nome de la Gesellenverein, kun kiu la katolika E-movado en Vieno kaj Aŭstrio vere tradicie estas ligita, kaj li memoris pri la diversaj eminentuloj ĉi tie jam ĉeestintaj, parolintaj kaj agintaj. — W. M.

Aŭstria Esperanto-Kongreso

Ni atentigas ĉiujn AKLE-anojn, ke dum la nunjara kongreso en Graz ankaŭ okazos fakkunsido kaj Di-servo, dimanĉe la 17. 7. 1949. Pluaj detaloj sekvos. Aliĝu kaj partoprenu multnombre!

Vienaj katolikaj Esperantistoj

regule kunvenas ĉiun duan kaj kvaran mardon de la monato en la hejmo de „Kreuzbund", Wien I., Graben 13/I/II/25, de la 17—19 h. Samloke okazas ĉiumarde de la 19.15—20.30 h porkomencanta kurso.

AKLE-grupo en Salzburg

Ni sciigas la adreson de la novfondita AKLE-grupo en Salzburg kaj petas ĉiujn katol. geesperantistojn, ke ili aliĝu kaj aktive kunlaboru. Adreso: Domvikaro J. Kaps, Salzburg-Parsch, Gaisbergstraße 7.

Memore al pastro d-ro M. J. Metzker

Pasko-dimanĉon, la 17. 4. 1949, ni memoris okaze de la 5a datreveno la tagon, kiam d-ro M. J. Metzker (Frato Paulo) mortis kiel martiro por la paco kaj unueco en Kristo en arestejo de Brandenburg. La martira pastro estis ankaŭ aktiva esperantisto kaj iam eldonis en Graz la katol. E-gazeton „Katolika Mondo". La katol. E-grupo de München honoris lian memoron per alpreno de la grupa nomo „Frato Paŭlo".

Ĉefepiskopo de Bamberg

en Bavarujo transprenis en sia diocezo la protekton super la Germana Katolika E-Unuiĝo.

„Oberösterreichische Schulblätter"

la faka organo de la katolika instruistaro de Supra-Aŭstrio, enhavas tre bonan artikolon titole: Instruisto kaj Esperanto, verkita de lernej-direktoro s-ano J. Jungschaffer el Ried/Inn.

Ges-roj W. H. Browne kaj Mary Lippert

gemembroj de la Londona E-Klubo, kore salutante ĉiujn siajn geamikojn, plezure anoncas, ke ili geedziĝis sabate la 5. 3. 1949 en Purley.

S-ino Mary Lippert estas nia bonkonata Viena s-anino kaj iama aktiva membro de AKLE kaj „Danubio".

Skoltoj esperantistaj en ĉiuj landoj

Skribu multnombre kaj tiel pruvu al la redakcio de „Lagerfeuer", Wien I., Ebendorferstraße 6, ke vi ekzistas! Rekomendu al la adresoto, tradukigi viajn skribaĵojn de „Esperanto-Centro", Wien I., Neutorgasse 9. — Skolte vin salutas d-ro Adolf Halbedl, Knittelfeld, Aŭstrujo.

Esperantistoj katolikoj!

Kunlaboru kun „Katholische Pressezentrale", Wien I., Herrengasse 14.

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

La Aŭstria Esperanto-Instituto en siaj Aprila kaj Maja kunsidoj priparolis la programon por la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz kaj decidis por sia kongresa kunsido jenan tagordon:

1) Raporto de la sekretario
2) Reelekto de la estraro
3) Laborprogramo kaj kunlaboro de la ekstervienaj membroj
4) Diskutado

Krome estas anoncitaj jenaj paroladoj, kiuj laŭ la kongresa programo okazu mardon, la 19an de Julio, vespere en la Universitato de Graz:

a) prof. Adolf Hainschegg, Graz: Esperanto kaj mondliteraturo (verŝajne en germana lingvo),
b) Ernst Werner, Wien: La originala stilo de Esperanto (en Esperanto)

Interesiĝantoj povas peti la Regularon de la Instituto kontraŭ alsendo de leterafranko. Kunlaboremuloj, kiuj deziras membriĝi, devas tion letere peti, aldonante mem skribitan biografion kaj speciala elmontro de la jam faritaj laboroj por Esperanto.

Dum Julio kaj Aŭgusto ne okazos kunsidoj de la Instituto en Vieno.

Internacia ESPERANTO-MOVADO

Esperanton en la olimpiadon!

De la 22. Aprilo ĝis komence de Majo ĉi. okazis en Romo grava kunsido de la Internacia Olimpia Komitato. Nia senlaca E-pioniro kalkul-konsilisto R. M. Frey, Wien, lerte eluzis tiun okazon por propagandi Esperanton por la olimpiado. Rekomende de la aŭstria ĝeneralpoŝtdirektoro d-ro K. Dworschak, s-ro justec-ministro d-ro Gerö, prezidanto de la Aŭstria Olimpia Komitato, komisiis la aŭstrian reprezentanton ĉe la Internacia Olimpia Komitato, s-ron ing. Manfred Mautner-Markhof, ke li pledu ĉe la konferenco en Romo por Esperanto en la servon de la olimpiado por pli bona interkompreniĝo inter la sportuloj ĉiulande. Pri eventuala sukceso sekvos raporto pli poste.

Malagrabla sciigo pri UNESCO

La nova ĝeneraldirektoro de UNESCO faris la 21. 2. 1949 en Bruselo paroladon pri la misio de tiu grava eduk-organizo de UNO kaj inter alie diris pri la lingvoj artefaritaj, ke „. . . nur blinda optimismo povus imagi, ke ili finfine anstataŭus realajn lingvojn, kies vortaroj estas ĉerpintaj trezorojn el la trovita sperto de unu popolo, el la ĝojo kaj malĝojo de ties poetoj kaj la pensoj de ties filozofoj . . ."

UEA oficiale protestis letere al UNESCO pro tiu eldiro de ĝia ĝeneraldirektoro kaj estas rekomendinde, ke

ankaŭ la esperantistaro tutmonda skribu Esperante al: D-ro Torres Bodet, ĝeneraldirektoro de UNESCO, 19, Avenue Kléber, Paris 16, Francujo.

Persekuto de Esperantisto

D-ro J. Maynar Duplá, dekano de la Kemia Fakultato en la universitato de La Laguna, Kanario, iniciatis E-kurson en la nomita universitato. Sed la oficiala studenta gazeto „Arriba Espana" aperigis mensogojn kaj kalumniojn kontraŭ la esperantistoj kaj la rektoro de la universitato, katolika pastro, pro tio ĉesigis la E-kurson. D-ro Maynar Duplá kritikis tiun decidon kaj pro tio la rektoro proponis al la hispana ministro de publika instruado, ke li eksigu d-ron Maynar el lia posteno kiel dekano, ĉar la rektoro ne volis toleri, ke subulo ne akceptu lian verdikton sen protesto. La ministro fakte akceptis la proponon kaj eksigis d-ron Maynar la 31. 12. 1948 pro defendo de Esperanto (El „Esperanto" 3/49).

Portugalujo ankaŭ persekutas Esperantistojn

En Portugalujo la sekreta polico vizitis kaj traserĉis la loĝejon de la UEA-delegito en Lisboa. En Madejro la ges-anoj devis transdoni al la polico ĉiujn emblemojn, Esperantaĵojn, dokumentojn k. s.

Certe ĉiuj liberamaj, progresemaj kaj demokrataj esperantistoj en tutmondo protestas plej forte kontraŭ tia perforto flanke de la registraro portugala.

Internacia ekspozicio en Italujo

pri infanaj desegnaĵoj havis grandan sukceson. S-ro R. Levin el Liono, kiu kolektis pasintjare la desegnaĵojn, sendis 670 desegnojn en Novembro al Milano, kie ili estis ekspoziciitaj en la Moderna Galerio. La infanaj desegnoj trovis intereson de la lokaj aŭtoritatuloj, de la kulturaj kaj pedagogiaj rondoj, eĉ de la urbanoj mem. Okaze de la malfermo parolis universitata prof. G. Canuto pri la celoj kaj utileco de Esperanto antaŭ altrangaj vizitantoj. La desegnoj poste estis ekspoziciataj Decembre en Parlla kaj poste en Venecio kaj ĉie altiris la atenton de vasta publiko ankaŭ pri Esperanto.

Internacia renkontiĝo en Strasburgo

La 16. kaj 17. Julio 1949 la laboristaj esperantistoj de la franclingvaj landoj okazigos renkontiĝon en Strasburgo kaj invitas la gekdojn alilandajn partopreni ĝin. En ĝia kadro ankaŭ okazos kunveno inter la SEAT (Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda) por pridiskuti la enkondukon de Esperanto en la laboristajn organizojn. Aliĝkotizo: 150.— fr. fr., por alilandanoj 8 resp. kup. Adreso: Sekretariino Zipfel, 20, str. Laborque, Strasbourg (Bas-Rhin), Francujo.

Tutmonda Junulara Organizo (TJO)

organizos sian Internacian Kunvenon en Versailles, Francujo, de la 3.—10. 8. 1949. Povos partopreni gejunuloj sciantaj kaj komprenantaj Esperanton sufiĉe bone. Kostoj inkluzive loĝado, manĝado, ekskursoj, estos 3500—4000 fr. fr. Pli detalajn informojn petu kontraŭ reafranko de peranto s-ro Omont, 66 rue Albert Joly, Versailles, Francujo aŭ de la landa peranto.

Conselho Federal de Comercio Exterior

(Federacia Konsilantaro por Eksterlanda Komerco) plenumas specialan servon celantan sciigi al la firmoj interŝtataj pri la interŝanĝo de ĉiuj informoj rilate eksporto kaj importo kaj eldonas komercaĵlistojn en hispana, angla kaj Esperanta lingvoj. Adreso: Conselho Federal de Comerco Exterior, Avenida Presidento Wilson, 164—7 Andor, Rio de Janeiro, DF., Brasilo.

Filmo en Esperanto

La grava germana filmfarejo „Alfa Film-Produktion" nuntempe filmigas la verkon de la designisto-humoristo Wilhelm Busch „Aventuroj de fraŭlo" kaj

decidis la filmon sinkronizi en Esperanto; ĝi estos desegnita kaj aperos en Aŭgusto ĉijare. En okazo de sukceso „Alfa" intencas filmigi ankaŭ aliajn verkojn de Busch. Eventualaj tradukontoj kontaktiĝu kun s-ro Günther Jakob, Postfach (13a) Ansbach, Mittelfranken, Germanujo. (La „Praktiko" I/1949).

Skandinava Aerlinia Sistemo

komencis uzi Esperanton en sia propagando kaj eldonis Esperant-lingvan tre bele ilustritan faldprospekton, pro kiu oni devas gratuli al SAS. Petu senpagajn ekzemplerojn por vi, viaj klubaŭ kursanoj de Skandinavia Aerlinia Sistemo, Reklama oficejo, Store Kongensgade 29, Kopenhago K., Danlando.

Sveda socia strukturo kaj Sveda socia politiko

estas temoj de Internacia kurso en la Popola Altlernejo de Viskadalen, proksime de Gotenburgo. La kurso okazos de 26. 6.—10. 7. 1949 kaj la aranĝantoj estas: Sveda E-Instituto, Sveda E-Federacio (Tegelbacken, Stockholm) kaj Sveda Laborista E-Asocio (Barnhisgatan 8, Stockholm). Prospekton vi povas peti de unu el la nomitaj organizoj.

Ofico por Popolklerigo en Berlino

fine starigis oficialan Esperanto-sekcion post venko de multaj malfacilaĵoj. Por pruvi al la nomita ofico la disvastiĝon de Esperanto, bonvolu peti de ĝi diversajn seriozajn informojn kiel ekz. pri E-instruado en Berlinaj lernejoj k. s. demandoj. Sed n e menciu tiun alvokon! Skribu al: Bez.-Amt Neukölln, „Esperanto-Sekcio" der Abt. Volksbildung, (1) Berlin-Neukölln, Rathaus, Germanujo.

Internacia koresponda klubo „ABC"

ebligas al vi amikan aŭ komercan korespondadon, interŝanĝon de poŝtmarkoj, vidaĵkartoj k. s. Membrokotizo 15 resp. kup. por kio vi ricevos sempage 5 foje jare „ABC - Tutmondadresaron" kaj „ABC-Internacian Borson". Prospekton sendos: Prof. Petro Zvél, Kralovice apud Plzeň, Cehoslovakujo.

Hispana Esperanto-Federacio

jam tiel fortiĝis, ke ĝi povas eldoni presitan bultenon. Estas ĝojige, ke la E-movado nun ankaŭ en Hispanujo denove ekfloras. Adreso: Hispana E-Federacio, Ruzafa 7, Valencia, Hispanujo.

Internaciaj Someraj Kursoj

aranĝotaj de Nederlanda E-Asocio „La estonto estas nia" kaj Flandra Ligo Esperantista opazos la 28. 7.—4. 8. 1949 en Kerk Avezaath, Nederlando. Eksterlandaj ges-anoj estas invitataj partopreni. Petu Prospekton kaj informon de s-ro P. W. Baas, Corn. Krusemannstr. 43, Amsterdam-Z.

Internaciaj Feriaj Kursoj

okazos en Helsingor, Danlando, de 17.—25. 8. 1949 sub aŭspicio de UEA kun tre interesa programo. Prospekton petu de s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danlando.

Svislando

La 17.—24. 4. 1949 okazis en Häbernbad la jarkunveno de Svisa E-Asocio kaj feriaj kursoj kun interesaj prelegoj kaj E-ekzamenoj.

Hungarujo

En la Instituto de Edukscienco en Budapest kaj en la urbo Szeged estis instalataj E-kursoj por geinstruistoj. En 13 hungaraj urboj jam ekzistas E-stratoj.

Federacio de Islandaj Esperantistoj

estis fondita komence de 1949. Aŭstria E-Federacio sendas al la novfondita federacio korajn salutojn kaj deziras al ĝi prosperon kaj sukceson.

Radio Sofio

nun dissendas ĉiutage je la 21a h. or. tempo aŭ 20a h. MET 15 minutoj raportojn kaj informojn en Esperanto per

ondo 39.11 m. Skribu kuraĝigajn leterojn aŭ PK al Radio Sofio, E-emisio, Sofio, Bulgarujo.

Sveda Radio — MET

dissendas informojn en E lunde de 8.15—8.30, ondoj 49.46 kaj 31.46 m, lunde de 16.15—16.30, ondoj 19.80 kaj 27.83 m, marde de 2.15—2.30, ondoj 49.46 kaj 31.46 m. Sendu instigajn let. aŭ PK al la stacio: Sveda Radio en Stockholm.

Praha — Č. S. R.

dekpaĝa faldprospekto en Esperanto kun arte belaj ilustraĵoj estas eldonita de la prezidantaro de la ĉefurbo Praha kaj senpage ricevebla ĉe: Cizinecký svaz, Praha I., Obecni dům u. Prašné brany.

„La plej humoraj anekdotoj"

kun multaj karikaturoj estu eldonata libro, por kiu estas serĉata en tutmondo la respektivaj anekdotoj. Sendonte anekdotojn aldonu 2 resp. kup. kaj vi ricevos la libron post ĝia apero. Adreso: Sepp Hönig, (20b) Bad Harzburg, Haus Mansfeld, Germanujo.

El Sovjetio ne venas respondo

Diversaj geesperantistoj plendas, ke ili ja skribis al adresoj de sovjetiaj esperantistoj, sed neniam ricevas respondon, ankaŭ ne revenas la leteroj, se eventuale la adreso ne plu ĝustas. Kompreneble tiamaniere oni ne povas krei deziratajn kulturajn interrilatojn inter Sovjetio kaj aliaj landoj (vidu noteton el „Internacia Kulturo", Sofio, represitan en AER n-ro 7—9/1948, pĝ. 94). Tion oni nur povas bedaŭri kaj oni ne miru, ke estas parolata figure pri „fera kurteno" disiganta la Sovjetunion de la ceteraj landoj en la mondo.

Bulgara E-Asocio — Junulara Fako

La Centra Estraro de la Junulara Fako ĉe Bulgara E-Asocio (Str. „Tri uŝi" 15. Sofio) petas ĉiujn progresemajn ges-anojn sendi al ĝi materialojn pri junulara enhavo. La materialo estos publikigata en la revuo „Internacia Kulturo" kie nun aperos speciala rubriko „Junulara Vivo", aŭ en iu bulgara gazeto. La sendinto ricevos la numeron de la gazeto, en kiu aperis lia raporto, artikolo k. s.

Bibliografio

„Das ist Graz." („Tio estas Graz.")

Bildlibro pri Graz, la ĉefurbo de Stirio, eldonita de „Styria, steirische Verlagsgesellschaft". 64 paĝoj, 60 bildoj, duontole bindita, 24.— aŭstr. ŝil.

Gustatempe por nia Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz aperis tiu ĉi belega bildlibro kun multaj artaj fotografaĵoj pri pejzaĝoj, konstruaĵoj, artmonumentoj kaj aliaj ĉarmaj vidindaĵoj de Graz; enkondukaj vortoj kaj bildklarigoj en la lingvoj germana kaj angla. La libro estas rekomendinda kiel preparo por la vizito de Graz kaj same kiel valora rememoraĵo pri tiu ĉi urbo.

Esperantistoj, kiuj deziras akiri tiun libron, mendu ĝin aŭ per „Tramondo" aŭ rekte ĉe la eldonejo en Graz, Schönaugasse 64, proponante uzi por eventuala dua eldono ankaŭ Esperanton!

E. Pebe.

„Esperanto: The World Interlanguage" (E: la tutmonda interlingvo) estas la titolo de speciale signifa verko, parte anglalingva, parte en Esperanto, aperigita de EANA (E-Asocio de Norda Ameriko), eldonita ĉe The Beechhurst Press, New York. Aspekto kaj aranĝo plaĉa, tole bindita, form. 13×18, 245 pĝ., prezo 2 us. dol. Kompilita de kvar gesanoj, vere spertaj fakuloj: G. A. Connor kaj Doris T. Connor, d-ro W. Solzbacher kaj P. d-ro J. B. Se-Tsien K a o, fama misiisto. La volumo konsistas el 6 partoj.

Tiu certe novspeca libro sin turnas, parte en angla lingvo, precipe al la

anglo-lingvanoj kaj trafe kontraŭas la ĉiam ankoraŭ aŭdeblan argumenton, ke la angla lingvo ja estas 1 a mondlingvo. La libro ĝuste en la nomo de la anglo-lingvanoj pledas por Esperanto. Enestas resumo pri la Esperanto-literaturo kaj la diversaj E-movadoj.

La menciita verko i. a. jam tre utile servis al d-ro M. Führing, direktoro de la aŭstria ŝtata ekzamen-komisiono por Esperanto kaj al kortega konsilisto d-ro F. Wollmann por verkado en la sfero de pedagogio. W. Mudrak.

„Enketo pri internacia helplingvo"

estas la titolo de 32 paĝa broŝuro, vere interesa, unika kaj tre valora dokumento, kiun devus studadi ĉiuj lingvistoj, pedagogoj, E-instruistoj, propagandistoj k. a. La kompilita materialo igas eldiri la aŭtoron fine de la verketo: „Nia konkludo estas do, ke same de psikologia vidpunkto kiel de teknika, Esperanto estas vivanta helplingvo, taŭga por esti rekomendata kiel sola mondhelplingvo."

Por ĝuste recenzi la libreton, oni devus skribi ampleksan artikolon. Tia! ĉiu serioza esperantisto havigu ĝin por diversaj celoj.

„Enketo pri internacia helplingvo" estas raporto de la Instituto Rousseau en Genevo, pri scienca esploro koncerne la rezultojn de instruado en E-kursoj. Direktoro Pierre Bovet de l'Instituto por Edukssciencoj, bonege kunmetis la rezultojn de longjaroj kaj UEA iniciatis la publikigon de la libreto. La Sveda E-Federacio prenis sur sin la taskon eldoni la verketon, pro kio ĝi meritas sinceran dankon kaj rekonon.

La eldonkvanto ne estas granda kaj tial tuj mendu ekzempleron de tiu bonega libreto je nur 5 resp. kup. ĉe via landa libro-servo aŭ ĉe Sveda E-Federacio, Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.

Stenografio laŭ la sistemo de Melin

Aranĝita por Esperanto de Otto A. Nilsson. Eldona Societo Esperanto. Broŝuro 10 paĝa, prezo 1 sv. krono.

La sistemo estas laŭlitera mallongskribo: la vokaloj estas suprenstrekoj, la konsonantoj malsuprenskribataj signoj. Kelkaj „monogramoj" ŝajne estas prenitaj el la geometriaj sistemoj. La fundamentaj principoj de ĉiu bona stenografio: „Por la plej oftaj literoj la plej mallongaj signoj kaj por la plej multe kuniĝantaj la plej kombineblaj signoj!" ŝajnas ne sufiĉe efektivigitaj. Sed tiu manko aperas en preskaŭ ĉiu nura „alfaro" (adaptaĵo) de nacia sistemo. Krome en la ĝenerala aspekto de la stenografaĵoj laŭ Melin iom troas la longaj streketoj aŭ interligoj, kiuj ne estas rapide (kaj samtempe klare) skribeblaj.

Entute: La sistemo taŭgas verŝajne nur por tiuj esperantistoj, kiuj konas kaj uzas la originalan sistemon de Melin.

Ankoraŭ unu rimarkigo: Jam ekzistas preskaŭ pli multaj Esperanto-stenografioj ol esperantistaj stenografoj. Ĉu tio povas ĝojigi? Esperantistoj, ne eltrovu novajn kaj novajn sistemojn, gazetojn k. t. p., sed p r a k t i k u l a j a m e k z i s t a n t a j n! E. Pebe.

Historio de Nederlando

Verkita de Agostinho da Silva, Esperantigita de Freitas Martins. Kajero kun 27 pĝ. el la serio Enkonduko en la Kulturon, eldonita de la Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa, 49—1, Porto, Portugalujo. — La libreto en flua stilo donas koncizan superrigardon pri la historia evoluo de Nederlando.

Komunikoj de la redakcio.

Pro manko de loko en la malpliigita amplekso de la revuo diversaj artikoloj daŭre devas esti prokrastataj, pro kio ni petas senkulpigon de la aŭtoroj. Sendontoj de manuskriptoj, dezirantaj informon pri akcepto aŭ neakcepto de siaj artikoloj nepre devas aldoni reafrankon, ĉar sen aldono de reafranko manuskriptoj ne povas esti resendataj. Denove ni atentigas ke manuskriptoj devas esti skribitaj nur unuflanke kaj kun interspaco inter la linioj.

Mary kaj Sulo
koresponda rakonteto pri amikiĝo de brita knabino kaj finna knabo, verkita de Kamemoro, 16 pĝ., poŝtformato. — Vägvisare Till Världsspraket (Vojmontrilo al la Mondlingvo) nova svedlingva reklamilo por Esperanto, verkita de V. Setälä, enhavas 500 vortojn, per kiuj oni povas formi 10.000 novajn vortojn. Prezo por ambaŭ libretoj kune kun la sveda ŝlosilo 1 sv. kr. — Nykel Till Esperanto (Sveda E-Slosilo) aperis en la eta ŝlosilformato kun 32 pĝ., prezo 0.25 sv. kr. — Katalogo B, 24 pĝ., enhavas preskaŭ 400 E-librojn, havebla ĉe la malsupre indikita eldonejo. La antaŭe menciitaj 5 broŝuretoj aperis ĉe la Eldona Societo Esperanta, Stockholm 19,, Svedujo.

Vintro en slovakaj montaroj

Titolo de ampleksa kaj belege ilustrita varbprospekto en Esperanto, eldonita de la direkcio por fremdultrafika oficejo Slovakotour en Bratislava, Cehoslovakujo.

*

Kristana Frataro
eldonas kolore ilustritajn foliojn kun tekstoj elĉerpitaj el la Biblio. Krome la redakcio ricevis broŝuretforme la bonege Esperantigitajn Evangelion laŭ Sankta Johano kaj Evangelion laŭ Sankta Marko. Adreso: Int. Kristana Frataro, 21 Mitchell Road, Palmers Green, London, N. 13, Anglujo. Aŭstria reprezentanto: Alois Hilkersberger, Lotzweg 1, Landeck, Tirol. Informojn kontraŭ reafranko.

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. — Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. — Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. — Papierzuweisung 101/48/4-5, Bezugscheinnummer 61/86.